



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

n. 153
154

.unuigo de la normandaj esperantistoj
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.


PRINTEMPO - SOMERO 1986A . (N° 68A - 69A NOVA SERIO).

- *****
- * REDAKTAS : Annie GAILLARD, 4 rue Louis Jouvét
 - * 76800 ST ETIENNE DU ROUVRAY - Tel. 35-65-10-11
 - *
 - * Eldonita, ekspedita de :
 - * UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. n° 283 40 H ROUEN
 - *
 - * KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 30 F. Subtena ek de 40 F.
 - * Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco : 30 F
 - * "La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj
 - * artikoloj"
- *****


NIA KUNVENO en

PORT - BAIL
en Cotentin

**4 - 5 AN DE
OKTOBRO**




L'Eglise Notre-Dame (X^e et XI^e siècles)



VILLAGE DE VACANCES

« La Porte des Iles »




Por nia jara Ĝenerala Kunveno,
nia amiko Pierre ROBIDOLLE
invitas nin en PORT BAIL

sabaton la 4an kaj dimanĉon
la 5an de Oktobro 1986a

Ni loĝos kaj kongresos en
moderna, komforta feria vilaĝo
apud sabla strando, fronte al
insulo "JERSEY", 2 km for de
la urbeto "PORT BAIL".

En tiu feriejo estas 214 moder-
-naj dormĉambroj kun privata
lavokonko en ĉiu ĉambro kaj
individua elektra hejtilo.

ATTENTU !



ATTENTION ! EN RAISON DU
RETARD DANS LA PARUTION DE
CE BULLETIN, VEUILLEZ RETOURNER
LE PLUS TOT POSSIBLE, AVANT LE
22 SEPTEMBRE, LE BULLETIN
D'INSCRIPTION CI-INCLUS.
A L'AVANCE, MERCI !

EKSKURSOJ :

SABATE, LA 4AN DE OKTOBRO 1986A :

BRICQUEBEC (VIZITO AL LA ABATEJO
KAJ ĈEFTURO:).

VALOGNES (MUZEO DE CIDRO) VIZITO
AL DISTILEJO.


SAINT SAUVEUR LE VICOMTE (VIZITO
AL KASTELO KAJ MUZEO BARBEY
D'AUREVILLE).

DIMANĈE, LA 5AN DE OKTOBRO. :

CHERBOURG (VIZITO DE LA URBO).
OKCIDENTA MARBORDO : PORT RACINE -
POINTE DE LA HAGUE. NEZ DE JOBOURG
HALTO AL NUKLEA CENTRALO DE
FLAMMANVILLE.
CARTERET.

Por ĉiu ekskurso proksimume 50,00 F.
(sen la enirbiletoj por la muzeoj)
kondiĉe ke oni povu plenigi aŭtobu-
-son.

allo!..la cerisaie ?
278.68.86



UNION FRANÇAISE
POUR L'ESPÉRANTO

4 bis, Rue de la Cerisaie
75004 PARIS

C.C.P. 855.35 Paris

RAPORTO PRI DOMFRONT KUNVENIGO (Sylvie Caron)

PAROLADO DE S-RO QUILLAUD:Notindaj :

- ĉiuj departementoj estas reprezentitaj
- gratuloj al loka grupo pro bona organizado
- malmultaj eventoj en la Unuiĝo dum tiu jaro
- celoj de UNE :
 - . kunvenigi ĉiujn samideanojn independante de sia aliĝo al naciaj aŭ internaciaj asocioj
 - . helpi la lokajn grupojn por ekspozicioj kaj malfermo de kursoj
 - . informi pri spertaĵoj de lokaj grupoj
 - . informi pri naciaj movadoj kaj internaciaj

AKTIVECOJ DE UNE :

- 3 komitatkunvenoj
- ĉefa zorgo : eldonado de la bulteno, principa ligilo de UNEanoj
- UNE studas ĉiujn proponojn de lokaj grupoj
- lastaj komitatkunvenoj pri organizado de tiu renkontiĝo (loĝeblecoj kaj programeroj)

PROKSIMAJ RENKONTIĜOJ :

- La Haye du Puits (oktobro 1986 ; konkakti S-ro Robiol)
- Ĉielira en Normandio (Claude Rouget)

FINANCA RAPORTO :

- * Kaso hodiaŭ : 3830,82 F sen elspezoj de lasta bulteno.

- * UNE antaŭpagis 1000 frankojn por loĝejo Clairefontaine.

Elspezoj :

- * - malbonaĵo post Bayeux Kongreso
- * - monhelpo por vigla nova membro : 800 F
- * - spektaklo Krizalido : 600 F

BULTENO :

- * - okazas malfruaj raportoj
- * - la tajpistoj estas neprofesiaj kaj bonvolemaj
- * - la komitatanoj havas aliajn aktivuojn ekster UNE
- * Proponoj :
 - * - eldonado de bulteno pere de profesia printisto (Claude Rouget)
 - * - printado sur blanka papero (Tailpied)
- * do :

- * - altigo de kotizoj
- * - Annie Gaillard kolektos ĉiujn sendojn

ELEKTOJ :

- * Eliras : S-ro Quillaud, S-ro Tailpied
- * Forlasas : S-ro Tailpied, S-ro Nicolas
- * Kandidatiĝas : Annie Gaillard, Claude Rouget

- * Elektita komitato : S-roj Quillaud, Pottier, Lemarchand, Rouget -
- * F-inoj Domingo, Caron, Gaillard

VIVO de la GRUPOJ:

LE HAVRE

En nia Ejo, la tiel nomataj "Monataj Kunvenoj" regule sin sekvas. La kerno estas paroladeto, antaŭe preparita de iu membro, kiu okazigas postan debaton. Krome, ni ricevas klarigojn pri : la membroj, la kunvenoj, la vivo de Esperanto Ĝenerale ; la lernantoj de unuagrada kurso ĉeestas. Principe, oni devas ankaŭ paroli pri gramatiko ... sed fakte, ni akiras novan kutimon : "trinki glaseton" je l'naskiĝdato de membro, aŭ pri la lasta kunveno de la sezono ... aŭ la retrovo de la amikoj post la ferioj, ktp. . Seriozuloj diras ke tio instigas al krokodilado, pri tio ili pravas, sed nur parte, ĉar kelkiuj, ordinare malkuraĝaj en uzado de la Zamenhofa lingvo, trovas, el la simpatia glaso, la "vinan forton" por enpaŝi en la esperantan babiladon !

Afiŝtabulo en la sama loko, komuna al ni kaj la grava membraro de la Naturamikoj, informas, propagandas : artikoloj, bildoj, kaj humuraj desegnaĵoj de Jean Selle (el SAT-amikaro).

Kursoj : nun (marto) aktivas (modeste) : ĉiumerkrede je la 17a horo (3 personoj) kaj je la 18a (1 persono) = ambaŭ laŭ duonrekta metodo (Maurice Huet).

S-ino J. Sery havas novan privatan lernantinon. J. Gibaux prizorgas la instruon perletere de iu kiu ne povas ĉeesti la kursojn. Alain Chalm estas disponebla por gvidi elementan kurson ĉe M.J.C. ; li daŭre akceptas la matorojn por konversacio ĉi merkrede je la 19a horo.

Kemitat-kunveno okazis la 19an de Februaro : organizo de la trans-manigo de la gvidaj postenoj. Cerbumado por la vojaĝ-rilatoj kun Sotono. Ekrilato (perletero) kun la E-grupo en Dalian (Ĉinio). Alain Chalm presas la cirkulerojn monatajn kaj oni studas eblecon eldoni la temojn de la "Monataj Kunvenoj".

Kiel kontribuaĵo al la bulteno, mi skizos historion de la movado Esperanto en Lekzovio, transdonita de Sinjoro RAULT, veterana pioniro.

La unua oficiala manifesto estas menciita en la loka ĵurnalo "Lexovien", kiu raportas, la 2an de januaro 1909a, pri festeto inaŭguranta la "Lekzovian Esperantan Grupon". La sama ĵurnalo sciigas ke, dum la jaro 1912a, Sinjoro CHERON, urbestro, akceptis la honorprezidantecon de la Grupo, kies Sinjoro ROSEY, urbodoma sekretario, estis prezidanto.

Dum la jaro 1934a, la Grupo ricevis novan antaŭenpuŝon de Sinjoro ECHEVALLIER, direktoro de la lernejo Jean Macé ; la Grupo rekonstituiĝis sub la prezidanteco de Sinjoro Fernand RAULT, instruisto en Manerbe.

Dum 1936a, la Grupo akceptis la provincan kongreson de la diversaj normandaj grupoj. 116 partoprenantoj aliĝis.

... Alvenis la dua mondmilito, kaj la Grupo kolapsis.

... Emeritiĝinte, Gesinjoroj RAULT, geinstruistoj en Cambremer, transloĝiĝis en Lekzovion dum la jaro 1963a. Samjare alvenis alia esperantisto, Sinjoro MARTIN ; ili interkonsentis kaj kurso estiĝis ĉe la domo de Junularo kaj Kulturo.

Nova Grupo estis starigita la 2an de Februaro 1964a kies prezidantino estis Sinjorino Andrée RAULT. La saman jaron, la Grupo gastigis la kongreson de Normanda Esperanto Unuiĝo ; ĉeestis ĉirkaŭ cento da partoprenantoj.

Ĝis 1977a , la Grupo kontentinte prosperis : ĉiujare unu kaj du gradaj kursoj funkciis, la unua gvidata de Sinjoro MARTIN, la dua de Sinjorino RAULT ; ankaŭ estis ĉiumonata kunveno, oftaj ekskursoj, piknikoj, k.t.p.

Pro manko da intersemuloj, la kursoj ĉesis.

.../...

Laŭlonge de la jaroj, la anoj maljuniĝis, la renkontiĝoj maloftiĝis, la Grupo envintrumis.

Nuntempe, estus bombaste paroli pri Esperanto Grupo ; nur amika rondo kiu kunigas 12 aktivulojn kaj simpatiantojn ; ĉiulunde ok persistemuloj perfektigas esperantigante la verkon de A. DAUDET : "La leteroj el mia muelejo".

Camille MARTIN

VIRE

ESPERANTISTOJ, KIUJ VETURAS EN NORMANDIO, HALTU EN VIRE. LA URBO KAJ TIES REGIONO (BOCAGE) ESTAS JA VIZITINDAJ. S-Ro LEGRET. A - 14, RUE DES SABLONNIERES - VIRE - GVIDOS VIN TRA LA PENTRINDA URBO. VENU PASIGI KELKAJN TAGOJN EN VIRE.

Espérantistes, qui voyagez en Normandie, arrêtez-vous à Vire. La ville et sa région (Bocage) valent vraiment une visite. M. Legret A., 14, rue des Sablonnières, Vire, vous guidera à travers cette ville pittoresque. Venez passer quelques jours à Vire.

14500 VIRE ; Tel.: 31.68.00.05.

Nia amiko Alphonse LEGRET ĉiam sukcesas aperigi artikolojn pri la esperantista vivo en la loka gazeto de la "Vira" regiono ! Ĉi foje, li sukcesis, ke esperantolingva anonco aperu en la francolingva turisma broŝuro pri tiu ĉarma urbeto.

Jen la teksto, kiu aperas sur la 19a paĝo de tiu broŝuro, kiu estas senpage havebla ĉe : "Office Municipal du Tourisme" Square de la Résistance.

ROUEN

Dank al Esperanto, niaj klubanoj multe vojaĝis dum la someraj ferioj :

- S-ro JOUVIN al vjetnamio kiel franca reprezentanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM),

plie li starigis budon pri E^o dum politikaj festoj en Francio kun aliaj membroj de "Fédération Espérantiste du Travail".

- Benoît HUCHET el Boisguillaume, komencanto, piede pilgrimas ĝis Israelo, kaj Mezoriento, interalie por retrovi la spurbjn de la fondinto de la Bahaismo. Longe artikolo kaj granda foto aperis en Paris Normandie ĵus antaŭ lia foriro el Rouen.

- S-roj BERLOT (Mt St Aignan), JOUVIN (Gd Quevilly), VARNEVILLE (Sotteville) al Pekino kaj Ĉinio por la Universala Kongreso de U.E.A.

- Pascal DUBOURG al Italio, poste al La Chaux de Fonds Svisio por E^o-laboro kiel instruanto, sekretario kaj "ĉio-faranto" en la sidejo de Kultura Centro Esperantista, fine al Bouresse por staĝo pri ĵurnalisismo kaj pri Altaĵ studoj pri E^o. Li sukcese trapasis Ateston pri Kapableco. Gratulojn !

- K.C.E. (Svisio) ankaŭ akceptis Sinon LEROY (Bihorel) Finojn SNTAIS (St Etienne Rouvray), JOURDAINE (Rouen) por staĝo por komen-

-cantoj.
- Bouresse kaj la "Kvinpetalo" akceptis Elisabeth ROBBES (Malaunay) por muzika staĝo, ĵurnalisismo kaj pri Altaĵ studoj de E^o. Tie ŝi .../..

.../... sukcese trapasis sian unuan gradan ekzamenon. Gratulojn !
 - Gesroj QUILLAUD vizitis siajn korespondantojn en Jugoslavio, kaj akceptis hejmen Daninojn.
 - Annie GAILLARD kaj Dominique LEROY (Bihorel) partoprenis sukces-plenan Franc-Germanan Junularan Renkontiĝon en Grésillon.
 - Pascal MICHEL vojaĝis Norvegien.
 - Nia amikino ĉiam fervoje vojaĝas inter Parizo kaj Rouen/Sotteville (temas kompreneble pri Jacqueline LHERMITTE) pro siaj E^o-kursoj....
 versajne aliaj membroj de la grupo praktike uzis E^{on} ĉu eksterlande, ĉu hejme.... sed ni devas atendi ke grupkunveno okazu por havi "freŝajn" novaĵojn.

- Nia grupo estas oficiale registrita en la regiona adresaro de "CARTE JEUNES" (ministère de la Jeunesse et des Sports) Haute Normandie paĝo 56a en la rubriko " Rouen - spectacles et loisirs."

- Ĉar la unua eldono de 5.000 ekzempleroj de la faldfolio "Et si nous parlions E^o ?" rapide elĉerpiĝis, ni ĵus reeldonis 10.000 pliajn ekzemplerojn. Jam pluraj miloj estas antaŭ-menditaj de pluraj E^o grupoj en la tuta lando.

- Nia grupo ricevis antaŭ la somerferioj gravan mondonacon de bonkora anonimulo, kiu estis inter la du mondmilitoj agemulo en la Poŝta movado. Dankegon al li !

- Pascal DUBOURG, ĉiam agema, sukcesis aperigi anoncetojn en la regiona gazetaro pri la staĝoj en La Chaux de Fonds. Tiel li sukcesis varbi tri novulojn. Kiel ĉiujare artikolo pri la grupo aperis en "Petit Normand", same kiel pri Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj.

★ La Migranto ★

OFICIALA LIGILO DE LA ESPERANTISTAJ NATURAMIKOJ

ELDONITA DE LA TURISTA ASOCIO „LA NATURAMIKOJ“ ESPERANTO-FAKO (TANEF).



ĈU VI ĜATUS NATURON ?

Eble vi jam aŭdis pri asocio "NATURAMIKOJ". Tiu asocio estas vigla en Normandio kaj ĉefe en Seine Maritime.

La esperantistoj kunvenis plurfoje dum fin-semajnoj en la domoj de tiu asocio en Val de Saâne kaj Vaucottes.

Ĉu vi scias ke ekzistas esperantista sekcio de Naturamikoj kun belaspekta kaj ilustrita internacia bulteno : "LA MIGRANTO" ?

Se vi deziras konatiĝi kun tiu simpatia movado, bonu "LA MIGRANTO"n kiu aperas kvarfoje jare. Jarabono kostas nur 30,00 F.

ESPERANTO - MIGRANTO, 67 AVENUE GAMBETTA
 75020 PARIS. C.C.P. 2076-05-N. PARIS.

pierre QUILLAUD.

ESPERANTO-STAĜOJ POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ

Dum la tuta jaro Kultura Centro Esperantista, kiu situas montare flanke de la urbo La Chaux-de-Fonds (Svislando), organizas Esperanto-staĝojn, ĉu por komencantoj, ĉu por progresantoj.

La instruado, kiun gvidas Stefano Keller, efektiviĝas laŭ metodiko programita, aŭd-vida, pergesta, paroliga kaj legiga. Tiuj staĝoj daŭras unu semajnon. Studi matene, ferii la reston de la tago en amika etoso, jen io ege riciga lingve kaj kulture.

Petu la detalajn informilojn de KCE, PF 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

BONVOLU NOTI :

Por ke ne estu duboj pri la respondecoj en la eldona malakurateco de la lasta numero de Normanda Esperanto Bulteno (N°152a) kaj de la nuna (N°153a), kiu teorie devis aperi dum majo! (kiel mi skribis frontpage de la lasta bulteno), mi deziras sciigi al ĉiu leganto kaj membro de Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj, kvankam la nomo kaj adreso de Annie GAILLARD, kiel prizorgantino de N.E.B., aperas ĉekape de nia bulteno, ke ŝi ne kulpas pri tiu grava prokrasto. Mi povas certigi ke ŝi akurate tajpis dokumentojn kaj transdonis ilin al mi, por ke mi povu ilin finpretigi kaj aldoni aliajn por presado kaj dissendado. Same Gilbert BETTENCOURT el Bouville sendis akurate al mi la komputilajn adresojn sur etiketoj memglueblaj.

Nur mi kulpas pri tiu grava malfruo.

Sekve de tiu dua misfaritaĵo, sciante bone ke pro nuntempa troa okupateco kaj neebleco plenumi miajn taskojn kaj devojn kiel kuneldonanto de N.E.B., kasisto de U.N.E. kaj membro de la asocia estraro, mi ne povos daŭrigi tion estonte, la 2an de septembro, mi sendis leteron al nia prezidanto Petro QUILAUD klarigante mian decidon ne rekandidatigi al tiuj postenoj.

Pri anstataŭant(in)oj decidis la ĝenerala kunveno de U.N.E. en Port Bail. (50). la 5an de oktobro.

Tutsame kaj samdate (2/9/86) la diversaj estraranoj kaj agemuloj de la Ruena Grupo ricevis leteron en kiu mi klarigis la kialojn de mia eksigo el la estraro kaj prezidant-posteno de "Groupe Espéranto de la Région Rouennaise".

Miajn pardonpetojn al vi kara legant(in)o, kiu ne ricevis akurate vian bultenon, al la bultena teamo, al la estraro de U.N.E. kaj al Pierre ROBIOLLE, kiu tre certe, kiel organizanto de la ĝenerala kunveno en Port Bail havis (as) multajn malfacilaĵojn pro la malfrua apero de la kongresa informilo kaj aliĝilo.

Pierre Lemarchand.

KELKAJ CIFEROJ PRI U.N.E. KAJ NORMANDA E° BULTENO :

DEPARTEMENTOJ	NOMOJ	BULTENOJ	1981	1982	1983	1984	1985	1986
CALVADOS (14)	41	35	5	33	25	29	33	24
EURE (27)	25	21	4	10	8	20	12	5
MANCHE (50)	11	10	0	2	1	0	3	1
ORNE (61)	7	7	2	9	7	5	6	2
SEINE MARITIME (76)	129	116	28	55	63	64	66	56
NORMANDIO	213	189	39	109	104	118	120	88
EKSTER NORMANDIO	13	11	3	7	3	4	2	3
EKSTER FRANCO	8	8	1	2	1	1	0	0
INTERŜANĜOJ	30	30	-	-	-	-	-	-
LEĜA DEONO	(Ĝis 1985 : 13 bultenoj. De post 1986 : 0.							
SUME :	264	238	43	118	108	123	122	91
(laŭ la adresaro 1986/09/01)			pagis sian kotizon por tiu jaro					

La rubriko "NOMOJ" entenas la geedzojn, gefilojn kiuj scipovas E^on kaj loĝas ĉe la sama adreso. Ni do sendas nur 1 bultenon al unu sola adreso. Tial la diferenco inter "NOMOJ" kaj "BULTENOJ".

Post la sendado de la lasta bulteno kaj revoka letero, kiam ni ne havis eĥojn de personoj kiuj ne pagis kotizon de pli ol 3 jaroj, ni forigis tiujn nomojn el la asocia sliparo. Do, la ciferoj "Nomoj" kaj "Bultenoj" indikas la staton je la 1a de septembro 1986a.

Diferenco inter la nombro da kotizantoj inter 1981 kaj la sekvantaj jaroj : mi sisteme relancis tiuj kiuj "forgesas" pagi.
En la kolumnoj "1981" ĝis "1985" aperas la nombro da kotizantoj al Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj. Plejparte de la esperantistoj kaj de la kotizantoj al U.N.E. loĝas en "Haute Normandie" (Eure + Seine Maritime, ĉefe en tiu lasta Departemento.).

La diferenco inter la ciferoj de la kotizantoj kaj tiuj de la bultenoj senditaj, estas ke ni kutime senpage (do sen peti kotizon) sendas la bultenon al novuloj, lernantoj dum unu jaro. Tiuj personoj plejparte, krom la kontaktoj kun la kursgvidantoj kaj la ricevo de nia modesta bulteno, ne havas aliajn ligilojn kun la E^o-Movado.

Pri "1986" (ciferoj je la 1/09/86) ekzistas diferenco inter "1985/84" kaj la antaŭaj jaroj, ĉar kelkaj personoj kutimas pagi sian kotizon dum la ĝenerala kunveno, kiu ĉijare ne ankoraŭ okazis.

Pri "Ekster Normandio" : personoj kiuj translokiĝis ekster nia regiono kaj kiuj daŭras pagi kotizon al ni, aŭ respondeculoj de naciaj E^o-asocioj aŭ E^o-grupoj. Same pri "Ekster Francio".

Pri "Interŝanĝoj" : sendo de la bulteno al E^o-Bibliotekoj, Francaj E^o-asocioj, kelfoje interŝanĝe kun fakaj, lokaj, regionaj bultenoj.

Pierre Lemarchand.

79A KONGRESO DE UNUIGO FRANCA POR ESPERANTO (U.F.E.) : 1987

JARO DE LA JUBILEO DE LA INTERNACIA LINGVO
ĈE LA LAZURA MARBORDO EN LA GAILLARDE
APUD FREJUS - SAINT RAPHAËL
DUM PENTEKOSTO 1987A DE LA 5A ĜIS LA
9A DE JUNIO

Por digne festi la jubileon de Esperanto ni elektis kongresurbon en feria kadro : temas pri restadejo apud la maro, situanta 10 kilometrojn sudokcidente de ST RAPHAËL, ĉirkaŭita de arbaraj montetoj.

En la sama loko, vi disponos pri kongresejo, loĝejo kaj restoracio sed ankaŭ pri tenisejo, naĝejo, pilkludejo, ne parolante pri la maro trans la strato, aŭ eblaj promenadoj en la montoj.

Ĉiu ĉambro estas dulita, kun duŝejo, fri-dujeto kaj kafmaŝino. Pluraj estas speciale atingeblaj per rulseĝoj.

Por tiuj kiuj preferas tendumi, proksima kampadejo povas ilin akcepti kun ebleco mendi varmajn pladojn en la kuirejo aŭ aĉeti en magazeno mempreparotajn manĝaĵojn

Kromaj informoj ĉe "ESPERANTO" (Gesinjoroj LOISEL) Tour Vadon A. 83700 Saint RAPHAËL.

Dr. ESPERANTO.

LANGUE INTERNATIONALE

PRÉFACE

MANUEL COMPLET.

[por Francoj]

Pour qu'une langue soit universelle
il faut qu'elle soit de lui en donner la norme.

Prix 50 cent.

VARSOVIE.

En vente chez Gebethner et Wolff.

1887.

Programo : entenos krom la laborkunsidoj, distrajn vesperojn, balon, debaton, prelegojn kaj ekskursojn.

PLENA ANALIZA GRAMATIKO:

(4a kaj 5a eldonoj):
 "Listo de korektoj" havebla ĉe:
 LENTAIGNE, 3 Av. Gaillarde
 34000 Montpellier.
 Aldonu koverton afrankitan kun via
 adreso.

DEZIRAS KORESPONDI:

Kun junulino:

Pavel VLADYKA - 16 jara
 Jachymovska 279
 46010 LIBEREC 10
 ĈEĤOSLOVAKIO.

TOGO-ANO kiu instruas historion
 kaj geografion ŝatus ricevi E°-
 gazetojn, E°-librojn, broŝurojn
 por praktiki la lingvon:
 B.A. AGBEMADON
 C.E.G. de ZALIVE
 B.P. 134 - ANEHO . TOGO.

PASCAL DUBOURG, 3 rue Chédanne
 76150 - Maromme, Tel: 35.75.87.66.
 serĉas la jenajn librojn je malnova
 ŝtato kaj malalta prezo:
 - Plena analiza gramatiko de E°
 (Jaringhien - Kalocsay)
 - Enkonduko en la originalan lite-
 -raturon (Auld).
 - Esperanto en la lingvolaboratorio
 (Behrmann).
 - CSEH Kurso. (Cseh).
 - Esperantonimoj. (Gjivoje).
 - Kiel diri (Lentaigne).
 - Esprimoj de sentoj en E° (Privat)
 - E°-Lerneja eksperimento (Sonnabend)
 - Proverbaro Fr. - Ea. (Bourgois).
 Mi dankas al ĉiuj helpontoj!

27 JARA BULGARINO deziras korespondi
 kun juna Franco. Ŝi ŝatas muzikon
 bestojn, kolektas poŝtkartojn,
 lernas E°n kaj la Francan lingvon.
 Elie ALEXIEVA
 SOFIA-1373 /6 .114 Bx"8"
 Bulgario.



MUSEE ESPERANTO:

Dans huit salons (surface totale de 230 m²), c'est à la fois le musée, les archives, le centre de documentation et une exposition permanente de la langue internationale.

Il doit permettre la conservation de tous les documents (livres, journaux, copies, cours, dictionnaires...) édités dans la langue internationale.

Il visite intéressera non seulement les espérantistes heureux de se pencher sur leur histoire, mais aussi tous les gens curieux de ce phénomène vivant et significatif du monde moderne.


Musée National d'Espéranto,
 19 rue Victor Hugo.
 GRAY sur SAONE. Tel. 84.65.11.73.

TAGOJ DE LA POSTMARKOJ:

5/6AN DE APRILLO 1986A

Nia amiko MAURICE MARZAN el Sotteville les Rouen, kvankam nuntempe malsana, helpe de JEAN GIBAUUX el Le Havre, partoprenis filatelian ekspozicion pere de du temaj paneloj pri Esperanto kaj Filatelio en tiu urbo. Laŭ la Filatelio Havra Klubestro, estis la unua fojo, ke iu prezentis kolekton pri tiu temo kadre de tiu salono.

Multaj personoj haltis antaŭ la du paneloj, kaj niaj amikoj kaptis la okazon por disdoni la faldfoliojn "Et si nous parlions E°?". Bedaŭrinde la diversaj kolektoj prezentitaj ne estis oficiale prijuĝitaj. Tamen Maurice MARZAN, kelkajn tagojn poste, ricevis poŝtkarton de la Havra prezidanto, kiu gratulis lin pro lia "interesplena filatelia studo pri E°". Ni ĉiuj deziras al Maurice MARZAN rapidan resaniĝon!



ĜENERALA KUNVENO 1986 A

=====

PORT BAIL (50) - 4 / 5 -AN DE OKTOBRO .

(VILLAGE VACANCES FAMILLES "PORTE DES ÎLES" 50580 PORT BAIL
TEL. : 33.04.80.84.)

PROGRAMO :

SABATON, 4AN DE OKTOBRO :

- AKCEPTO EN LA CENTRO V.V.F. (VIDU MAPON DORSE)
 - KOMUNA TAGMANĜO
 - EKSURSO AL BRICQUEBEC, VALOGNES, ST SAUVEUR LE VICOMTE
 - KOMUNA VESPERMANĜO
 - DISTRA VESPERO
- 8.00H/12.00H.
12H30.
13.30H/18.30H.
19.00H/20.00H.
20.00H/22.30H.

DIMANĈON, LA 5AN DE OKTOBRO :

- MATENMANĜO
 - ĜENERALA KUNVENO
 - KOMUNA TAGMANĜO
 - EKSURSO AL CHERBOURG, LA HAGUE, FLAMANVILLE
CARTERET, NEZ DE JOBOURG...
 - ADIAŬA GLASO KAJ ... DISIĜO
- 8.00H/9.00H.
9.30H.
12.00H/13.00H.
13.30H/18.30H.
18.30H/19.00H.

Koncerne la aranĝoj en la Centro mem :

Sabate : Tagmanĝo + vespermanĝo + tranoktado) entute 206,00 F. po 1

Dimanĉe: Matenmanĝo + tagmanĝo

persono.

Tranokto : 45 F. - Manĝo : 50 F. - Matenmanĝo : 12,00 F.
Geknaboj ĝis 12j. pagos 156,00 F. por la tuta restado.

BONVOLU DISTRANĈI

ALIĜILO

PORT BAIL - KUNVENO.

sendota antaŭ la 22an de septembro al S-ro Pierre ROBIOLLE
18, impasse Jamot 50250, LA HAYE DU PUIITS. Tel.: 33.46.04.94.
Bonvolu pledi mi UNU aliĝilon po 1 persono.

NOMO :

VOKNOMO :

ADRESO :

Mi alvenos en la centro la [] an de oktobro je la [] horo.

Mi tranoktos : [] (nombro). Noktojn : [3/4] oktobro [4/5] [5/6]

Mi estos akompanata de S-RO , S-INO :

(Antaŭvidite : DU personoj en ĉiu dormĉambro.)

Mi partoprenos en la ekskursoj : SABATE

DIMANCE

Mi sendas kun tiu aliĝilo antaŭpagon de 100,00 F. po persono.

- ALIKOTIZO : 30,00 F.

- Ĝiro aŭ ĉeko al S-ro ROBIOLLE.

DATO :

SUBSKRIBO :

UNION DES ESPERANTISTES NORMANDS

* * *

ASSEMBLEE GENERALE 1986
PORT-BAIL 4/5.10.86

VILLAGES VACANCES FAMILLES "Porte des Iles" 50580 PORT BAIL Tel 33 04 80 84.

*

BULLETIN D'ADHESION

à envoyer avant le 22/sept.

à Pierre ROBIOLE 18, Impasse Jamot 50250 LA HAYE
LA HAYE DU PUITTS Tel - 33 46 04 94

Bien vouloir remplir 1 bulletin d'adhésion par personne.

NOM

PRENOM

ADRESSE

J'arriverai au Centre le Octobre à h

Je coucherai au Centre Nuits des : 5/6

Je serai accompagné de M. Mme...
(Il est prévu 2 personnes par chambre)

Je participerai aux excursions :

SAMEDI
DIMANCHE


OUI
OUI

NON
NON

J'envoie avec cette adhésion un acompte de 100.F (versement ou chèque à P. ROBIOLE). Cette somme sera reversée en cas de non participation, si j'en avise P. ROBIOLE avant le 25 Septembre). Cotisation : . 30,00 F.

Date

Signature



VIDAĴOJ EL
NIA
KONGRESEJO
EN
PORT BAIL.

TEKSTOJ
TRADUKITAJ
EL LA
FRANCA
FARE DE
PIERRE
ROBIOLE.

PORT-BAIL


Sufiĉe grava domgrupo stariĝis je la gallo-romana epoko sur la nuna teritorio de PORT-BAIL. Ĝia situo apud natura haveno komprenigas ĝian komercan inklinton kaj sendube ankaŭ la signifon de religiaj fondaĵoj en tiu loko komence de Mezepoko.

PORT-BAIL. La preĝejo al Dipatrino ŝajne poststariĝis monaĥejon detruiĝinta dum la normandaj invadoj. La skeleto de la navo datiĝas verŝajne de XII-a jc. En la XV-a jc. turo kun sonorilo estis konstruita je la suĉa flanko de la ĥoro. En la XVI-a jc. kapelo estis aldonita je la kontraŭa flanko de la konstruaĵo. Ĝia situo, borde de natura haveno kaj alsabliga haveno estis la kaŭzo de nombraj damaĝoj. Tiu situo klarigas ankaŭ la militistan rolon de la konstruaĵo kaj la fortikigon de ĝia sonorilturo (la suda turo havas krenelan parapeton kun ŝajnaj embrazuroj). La tegmentoj kaj la muroj estas el skisto, kio kontribuas al granda harmonio de la tuto. La navo etendiĝas sur gallo-romanaj konstruoj kaj, ne malproksime de tie, oni malkovris en 1956 baptlokon kun sesangula banejo (unika en la norda Francio), kiu jetas en konjektojn la historiistoj pri la devenoj de la kristanismo en la regiono. Ĉar tiu formo, signo de la orienta religioarto, instigas imagi, ke religiuloj venintaj el oriento kristanigis iujn lokojn, eble en la karolida epoko.

"LA KABO NOMITA "NEZ DE JOBOURG"

Sendube unu el la plej impresaj lokoj de "LA HAGUE": altaj je dekaj metroj klifoj kaj ondoj sin frakasantaj kontraŭ la rokoj. Estas grandioza pejzaĝo.

El "Nez de Jobourg", oni povas daŭrigi piede la promenadon dank'al la pado de la doganistoj, kiu serpentumas laŭlonge de la marbordo. En la urbeto, apud la preĝejo (XII-a jc., staras kruco el granito kun sur ĝia fusto du spadoj gravuritaj memore al bedaŭrinda duelo. En la preĝejo troviĝas romana banejo.



**VILLAGES
VACANCES
FAMILLES**

Association de Tourisme Social

VIDAJO EL LA INTERNAJO
DE NIA KONGRESEJO.
FAMILIA FERIA VILAJO
"LA PORTE DES ISLES"
2 KM FOR DE PORT BAIL
(MANCHE).

FRI LA UZINO DE BEAUMONT

Ekkonstruita en la jaroj 1960, tiu uzino kun ĝiaj centoj da hektaroj meze de LA HAGUE havas nun ege gravan influon en la regiono, tiom pro la modifoj de la vivkondiĉoj, kiom pro la ekonomio kaj dungeco. Ekzistas nur ĉu samtipaj uzinoj en la mondo (la alia estas en Japanio: TOKAY-MURA). Ili rolo estas apartigi, kaj poste, traktadi, stoki kaj liveri la kvar ĉefajn elementojn de la surradiaj brulaĵoj: uranio, plutonio, restaĵoj de la atomfendado kaj envolaĵoj de la nukleaj materialoj.

Oni alportas ĉi tie la surradiajn brulaĵojn per "kasteloj" de 35 ĝis 110 t. perŝipe, survoje, fervoje. Post longa periodo pri traktado oni vitrigas la traktitajn restaĵojn, kaj stokas tre profunde. Oni koncentras la uranion purigitan sub formo de nitratoj kaj oni transportas ĝin per konteneroj al uzinoj pri rafinado kaj konvertado. Tiu grandega aro, kiu disponigas multajn oficojn, grandskale modifis la aspekton de la regiono, kiu antaŭe tute ne estis industriigita. Por la vizitanto, temas pri vera ŝoko, kultura kaj estetika. Por la loĝanto, kiu al kutimiĝas pli malpli al tiu nova vivelemento, temas pri reala revolucio ĉiutaga.

Situanta meze de COTENTIN, SAINT-SAUVEUR-LE-VICOMTE posedas fanan fortikigan kastelon, kiun oni konstruis je la nodo de vojegreto mal-ebliganta preskaŭ iun ajn penetradon en COTENTIN el la sudo. La vilaĝo etendiĝis sur la ebenaĵo, okcidente de la kastelo, arbaŭflanke de la vojo al PORT-BAIL.

La nobeloj de SAINT-SAUVEUR ludis grandan rolon en la historio de Normandio. Néel II partoprenis en la ribelon de la baronoj kontraŭ Vilhemo-la-bastardo. Dum la centjara milito, Geoffroy d'Harcourt akcelis la el-ŝipigo en Normandion de la reĝo Eduardo la II-a. Li fariĝis pro siaj sinsekvaj aliĝoj al la angla kaj la franca partizanoj.

En la XIV-a jc., kiam COTENTIN estis denove franca, la fortreso suferis longan sieĝon faritan de amiralo el Francio Johano de Vienne.

En la XVI-a jc., la protestantoj okupis la kastelon poste reprenitan de Henriko la IV-a. Ludoviko la XIV-a donacis ĝin al hospitalo. La kastelo estis detruita parte pro la bombadoj en 1944.

LA KASTELO. Konstruita mezdekline borde de marĉaj terenoj, la kastelo je la X-a jc. estis nur fuorteto el ligno sur terbulo. Poste oni rekonstruis ĝin el ŝtonoj je la XI-a kaj XII-a jc. La artefarita terbulo troviĝis kie estas nun la ĉefturo superstaranta la valon de Douve. La ĉefturo, nomita turo Johano-Chandos, pro la nomo de la konstruanto angla je la XIV-a jc., estas alta de 25 m. kun kvadrata plano, kaj murapogiloj plataj.

